




Naskiĝo de Esperanto-domo, Kastelo Grésillon

KULTURAJ KAJEROJ, KROMNUMERO DE APRILO 1968

Naskiĝo de Esperanto-domo, Kastelo Grésillon

Enkonduko

LA ESPERANTISTA kulturdomo, la kastelo Grésillon, kiun ni intencas prezenti al vi, situas en tre malnova franca regiono ankaŭ nomata Anjou.

Tie megalitoj, aparte belaj dolmenoj, atestas pri tre antikva loĝantaro, kaj de post la romana okupado la loka historio mencias multajn faktojn, kiuj grandskale eniris la francan historion.

En la nuna departemento Maine-et-Loire, kiu ŝuldas sian nomon al la du ĉefaj trapasantaj riveroj, la bieno Grésillon, dek sep hektarojn ampleksa, kuŝas ĉe la limo inter Baugé, malnova kaj histoririĉa urbeto, kaj Pontigné, kampara komunumo. Diplomo de la epoko de Charlemagne (Karlo la Granda) montras, ke de la oka jarcento la distrikto Podentinacius (Pontigné) kaj najbaraĵoj apartenis al la fama abatejo de Sankta-Marteno de Tours. Je la XII^a kaj XIII^a jarcentoj, altnobeloj el Le Lude konstruis sur la episkopa teritorio la



belan preĝejon, kies dimensioj kaj stilo atestas pri iama graveco. Pri tiu komunumo Pontigné, en departementaj arĥivoj oni retrovas postsignojn de interna bieno La Rondellière, kiu poste dispartigita naskis la Grandajn Kampojn.

Nur en 1585 oni konstruis unuan kastelon jam nomitan Grésillon (el la malnova franca lingvo : « grilo-kantado ») sur parto de tiuj Grandaj Kampoj. La masona majstro René du Chesnel konstruis ĝin por la honorinda S^{ro} Julien Lebigot, kiu donacis ĝin kiel doton al sia edzino Jeanne Lebigot. En 1634 la bieno apartenis al Angélique Bellet, kaj en 1685 al S^{ro} René de la Cherbouillère.

Tempo pasis for. Iom post iom la kastelo ruiniĝis. Je la fino de la XIX^a jarcento, post incendio, la tiama posedanto decidis rekonstrui ĝin, por ke la bieno ne estu dispecigita de la heredantoj. Tiam la nova konstruaĵo estis starigita iomete antaŭ la malnova por konservi

ankoraŭ firmajn murpartojn, kiuj nun konsistigas parton de la kuirejo.

Tre bela Renesanca kameno el skulptita ligno, kiun oni admiras en mangoĉambro, ne apartenis al la antaŭa kastelo, sed estas tamen samaĝa. La enĉizitaj datoj « 1634-1882 » atestas pri la origino kaj reinstalado de tiu kameno en ĵus rekonstruita Grésillon.

De post la jaro 1951, esperantistoj el la tuta mondo renkontiĝas ĉiusomere en la kastelo Grésillon. Ili eklernas la lingvon, aŭ plulernas ĝin. Ili aŭskultas kaj pridiskutas plej diversajn temojn kulturajn, pedagogiajn, sciencajn, ktp.

Ĉiu nun bone scias tion, kaj eĉ konsideras ĝin kiel normalan eventon de la esperantista vivo. Sed nur kelkaj samideanoj, nun, vere scias, kiel naskiĝis la « kulturdomo de francaj esperantistoj », kiel ĝi faris siajn unuajn paŝojn en la esperantistan mondon.

Henri Micard, la fondinto de tiu domo, neniam trovis la tempon skribi la historion de tiuj naskiĝo kaj unuaj paŝoj. Al plibonigo de sia kreaĵo, ĝis sia morto, li dediĉis ĉiujn siajn minutojn, ĉar li multe pli ŝatis agadon senĉesan ol haltojn por malantaŭen rigardi kaj paroli pri la faraĵoj.

Vidante la rezultojn, ni nun konscias, ke li pravis, sed ni ankaŭ opinias, ke ni ŝuldas al tiu agema homo kelkajn minutojn da haltado por paroli pri li kaj lia kreaĵo. Tiu *Naskiĝo de Esperanto-domo* celas omaĝi ĝian fondinton, sen trumpetado, nur per prezentado de la okazintaĵoj.

La administrantaro de la kulturdomo.

Henri Micard

HENRI MICARD naskiĝis la 6^{an} de aŭgusto 1897, en Parizo. Liaj gepatroj permesis al li sufiĉe agrablan vivon, kvankam ili ne estis tre riĉaj. Lia patro laboris en ĥemi-laboratorio. La scienca etoso plaĉis al la juna Henri, kaj vekis en li nevenkeblan emon al lernado. Efektive, laŭlonge de sia vivo, senhalte, li interesiĝis pri ĉiuj ajn malkovroj kaj eltrovoj publikigitaj. Ekde sia infanaĝo, li antaŭvidis por si mem sciencon metion.

Sed ve! la sorto tute alie decidis. Kiam li estis dekunu-jara, li spertis teruran akcidenton. Iun tagon, li sekvis sian patron al kunveno de ĉasistoj. Tie kunestis kvar aŭ kvin ĉasistoj. Subite, pafilo falis teren, kaj la tuta plumbetaro eniris kruron de Henri staranta je malpli ol unu metro.

La kuracado estis treege doloriga, kaj daŭris plurajn longajn jarojn...

Sed, malgraŭ la suferoj kaj la malgaja antaŭvidita estonteco, la juna Henri, sola sur sia brakseĝo, daŭrigis sian edukadon.

En 1914 eksplodis mondmilito. Li estis deksep-jara. Pro ĉiutaga propagando, Henri, kiel ĉiuj francoj, forte deziris partopreni la militagadon. Sed liaj kruroj ne povis lin porti : li ne akompanis la kamaradojn.

Dume samvilaĝanoj mortis unu post la alia. La milito estis nur buĉado de homoj, detruado de vilaĝoj kaj urboj. Neniu el liaj kvar

samaĝuloj revenis en la vilaĝon... En lia animo naskiĝis forta emo al universalaj paco kaj frateco.

Kiam li edziĝis, Henri estis travivinta fuŝitan junaĝon. Li estis suferinta pro siaj kruroj, li estis sentinta sin ne utila ĉar li ne kapablis defendi sian patrolandon, sed li paŝis. Tiun miraklon li ŝuldis al sia neimagebla firmeco, ĉar ĉiu paŝo estis sufero.

Kaj tio estis nur komenco de ĉiutaga luktado sur ĉiuj flankoj. Kiel instruisto li dediĉis siajn liberajn horojn al instruado de plenkreskuloj kaj al diversaj instruaj aktivadoj. Li kuraĝe agis en sindikato kaj en politikaj rondoj.

Li esperantistiĝis en la jaro 1921, kiam li ĉeestis, en Sablé-sur-Sarthe, kurson de Esperanto gvidatan de S^{ro} Eschenbrenner. Li mem instruis la internacian lingvon, en la sama urbeto en 1934, kaj ekde la sekvanta jaro li fariĝis responsanto en la Esperanta movado dum somerlernejo en Le Cap d'Ail.

Tiu estis la dua somerlernejo, kiun ĉeestis H. Micard. La unua, organizita de S^{ro} Bourguignon, okazis en 1934 en Lesconil. Sed en Le Cap d'Ail la ĉeestantaj geinstruistoj decidis, ke Honoré Bourguignon ne plu povas sole organizi iliajn kunvenojn, kaj kreis asocion : Somera Lernejo,



kies sekretario estis H. Micard. Tre baldaŭ tiu asocio kunfandiĝis kun pli malnova Esperanto-asocio fondita de Charles Despeyroux; kaj tiel naskiĝis G.E.E. (Grupo de esperantistaj edukistoj), kiun prezidis ^{Fino} Jeanne Dedieu, kun Charles Despeyroux kaj Henri Micard respektive honorprezidanto kaj sekretario.

Do en la jaro 1936 H. Micard organizis sian unuan somerlernejon en La Tranche-sur-Mer. Li komencis sian laboron dum la Paskaj ferioj, en la elektita urbo, vizitante la urbestron, la lernejestrojn, la hotelojn, ktp.

Ĉiujare tiel okazis unu aŭ du somerlernejoj, jen ĉe marbordo, jen sur montaro.

1937 : La Tranche-sur-Mer kaj Sallanches.

1938 : Erquy kaj Poissy.

1939 : Pornichet kaj Gérardmer.

Sed la dua mondmilito ĉesigis ĉiujn esperantistajn aktivadojn...

G.E.E. reviviĝis en 1945 per somerlernejo en Sablé-sur-Sarthe. Sed la malfacilaĵoj por trovi hotelojn kaj lernejojn estis multe pli grandaj ol antaŭ la milito. Tial anstataŭ hoteloj kaj lernejoj Henri Micard serĉis domegojn, kiuj povus gastigi la esperantistojn, kaj kie okazus ankaŭ la kursoj.

Tiel funkciis pli-malpli facile somerlernejoj ĝis 1950.

1946 : Sassenage.

1947 : Sablé-sur-Sarthe kaj Belmont.

1948 : La Rochelle.

1949 : Angoulême kaj Granville.

1950 : Saint-Germain.

Nova ideo : Esperanto-domo

IUN TAGON de printempo 1951 gesinjoroj Micard babilis kun geamikoj. Ili rakontis, kiom malfacile estis trovi lokon por la somerlernejo. Efektive ŝajnis tiam, ke neniurbo povas gastigi G.E.E.-on dum la venonta somero. « Sed, respondis unu el la amikoj, kial vi serĉadas ĉiujare novan lokon? Estas nun domo aĉetebla en Sablé-sur-Sarthe, aĉetu ĝin. Tio solvos viajn problemojn. »

Tio estis la naskiĝo de nova ideo : Esperanto-domo posedata de la esperantistoj.

Sed ĉu la domo taŭgos? Ĉu la ideo plaĉos al la esperantistoj? Ĉu ili povos aĉeti domon? H. Micard vizitis la domon, kaj, antaŭ ol komenci la traktadon kun la posedantoj, li sin turnis al cent kvindek el siaj esperantistaj amikoj :

Cirkulero al la esperantistoj

LA ESPERANTO-KULTURDOMO

Esperantisto skribis al mi antaŭ kelkaj semajnoj : « Via somerlernejo estas tre bona afero ; sed kial ne fari plurajn ? Necesus almenaŭ unu, eĉ du, por la laboristoj, kiuj havas pagitan ferion. Kial ne estas faritaj studperiodoj por la instruistoj ? »

Jes, kial ne ?

La G.E.E.-anoj konas la respondojn al tiuj demandoj. Ili scias, ke la organizado de somerlernejo estas pli kaj pli malfacila, ĉar ni ne havas propran domon, beletan, komfortan, en agrabla regiono, kaj en kiu ni povus organizi, laŭ nia plaĉo, somerlernejojn, seminariojn, studperiodojn, kongresojn, ktp.

Vi certe diros al mi, ke tio estas revo. Sed tiu hieraŭa kaj hodiaŭa revo povas fariĝi morgaŭa realaĵo, se ni, ĉiuj kune, vere volas ĝin.

Estas en Sablé (Sarthe) aĉetebla bieno, kiun mi vizitis, kaj kiu ŝajnas al mi tute taŭga, post minimumaj necesaj plibonigoj, por gastigi kvindek personojn. Bela domo, bela parko kontraŭ publika ĝardeno, cent metrojn de la banejo, kaj ducent metrojn de la urbodomo.

Sed mi antaŭvidas la kontraŭdiron: Sablé estas nek ĉe marbordo, nek sur monto, ĝi ne estas alloga. Tio ne estas certa. Kion oni postulas, kiam oni ĉeestas esperantistan renkontiĝon? - Unue esperantistan etoson: ni havus ĝin; - agrablan kaj komfortan domon: ni havus ĝin; - facile atingeblan regionon: ni havus ĝin, ĉar Sablé estas sur la granda fervojo Paris-Quimper, kun halto de rapidaj trajnoj.

La urbo Sablé plibeliĝas jaron post jaro. La rivero Sarthe donas al ĝi agrablan aspekton. Ĝi posedas modernan banejon, agrablan publikan ĝardenon. Je tri kilometroj staras la abatejo de Solesmes. En la verda ĉirkaŭanta kamparo tre agrablaj promenadoj estas eblaj. Estas la deirpunkto de ekskursoj al marbordo (200 km), kasteloj de Loire (80 km).

Mi povas aserti, ke post plibonigoj la domo plaĉos al ĉiuj, kaj estos konsiderata kiel agrabla domo: ripozo en la parko, promenadoj en la kamparo, banoj, fiŝkaptado, ekskursoj, pilkludoj, teniso.

Certe ni povus trovi saman, eble pli bonan, domon, sed estas grava punkto laŭ mi: estas necese havi proksime estron de la kreaĵo. Mi esperas esti pensiulo post unu jaro. Eble mi povas disponi pri la necesaj jaroj por firmigi la aferon. Mi trovos en Sablé, mi tion scias, seriozajn helpojn. Mi estas certa, ke niaj amikoj en Angers, Le Mans, Nantes ne ŝparos siajn helpojn.

La afero estas tre grava por la tuta esperantistaro. Ĉu ĝi estas realigebla? Ĉu ĝi povas vivi? Tion ni tuj vidos.

REALIGADO

La bieno povus kosti kvar milionojn kvincent mil frankoj post traktadoj. Necesus unu miliono kvincent mil frankoj por ĉiuj necesaj pli-bonigoj. Mi kalkulas maksimume. Ni bezonus do ses milionojn da frankoj entute. Kiel havigi al ni tiun sumon? Per prunto kompreneble. Sufiĉus, ke sescent esperantistoj pruntedonu po dek mil frankoj, por ke ni havu la sumon.

Ni devus krei kooperativan asocion. Ni povus imagi tri manierojn por havi monon:

1. - Akcioj de dek mil frankoj, donantaj rajton administri la asocion, ĉiu akciulo havante nur unu voĉon en la decidoj, kvankam li havus plurajn akciojn. Gajno: kvin procentoj.

2. - Obligacioj de kvin mil frankoj. Gajno: kvin (aŭ kvar) procentoj.

3. - Donacoj al la asocio. Ĉiu persono, kiu donis almenaŭ kvin mil frankojn, estas enskribita kiel bonfara membro sur tabulo ĉiam videbla en la granda ĉambro de la domo.

VIVPOVO DE LA DOMO

Antaŭviditaj jaraj elspezoj:

- 5 % de la kapitalo:	300000.
- Gardisto:	150000.
- Imposto, asekuroj, telefono:	100000.
- Repago de la kapitalo (antaŭvidita en 20 jaroj):	300000.
- Sume:	850000.

Pro la repago de la kapitalo la procento malpliigos ĉiujare. Se la donacoj estos grandaj kaj multnombraj, malpli granda sumo estos repagenda.

Antaŭviditaj enspezoj :

- Dum la someraj ferioj, 3 grupoj da 50 ĉeestantoj dum 20 tagoj estas 3000 tagoj. Kun normala prezo oni povas havi profiton ĝis 200 frankoj, tio estas sume 200×3000 :	600000.
- Dum Paskaj ferioj, 1 studperiodo da 10 tagoj por 50 personoj :	100000.
- Pentekosto :	20000.
- Aliaj studperiodoj :	100000.
- Sume :	820000.
- Oni povas esperi ankaŭ havi subvenciojn :	50000.
- Sume :	870000.

Mi povas aserti, ke la domo havos grandan sukceson eksterlande, kie samideanoj deziras veni en Francujon. Sed estas alia punkto : mi estas preskaŭ certa, ke, ekster la Esperanta movado, estus facile luigi la domon por oficialaj studperiodoj de popola edukado. Tio donus pluajn enspezojn.

La pruntedonantoj riskos nenion, ĉar la bieno estos garantio.

Mi sendas tiun alvokon nur al centoj da esperantistoj.

Kion ni petas ? Ke ili simple diru, ĉu, se ni povus realigi la aferon, ili estus pretaj pruntedoni iun sumon, kaj kiamaniere.

Ni ĉefe petas, ke ili respondu, ke ili diru, kion ili opinias pri tiu projekto.

Se ni vidas, post tiu unua alvoko, ke ni povas daŭrigi, ni faros alian, pli grandan, alvokon ; ni eĉ turnos nin al ne-esperantistaj organizoj.

Ne ĵetu tiun cirkuleron ; serioze studu ĝin. Ni esperas viajn konsilojn kaj vian helpon.

Por G.E.E., H. Micard, instruisto, Epineux-le-Séguin.

Jen la unua ŝtono de la esperantista kulturdomo. Ĝi estis forta ŝtono, ĉar Henri Micard antaŭvidis ĉiujn detalojn, ĉiujn argumentojn kaj kontraŭargumentojn, streĉe pripensitajn dum sendormaj noktoj. Ĉio, aŭ preskaŭ, estis preta en la menso de Henri Micard. Li

eĉ trovis simplan manieron por havi la unue necesan monon : sescent esperantistoj pruntedonantaj po dek mil frankoj.

Baldaŭ la respondoj al tiu alvoko venis el ĉiuj anguloj de Francujo. Ili estis kuraĝigaj, kaj preskaŭ ĉiuj promesis monon. Tio sufiĉis por H. Micard, kaj li tuj komencis la traktadojn por aĉeti la bienon de Sablé-sur-Sarthe. Sed la afero rapide fiaskis, ĉar alia aĉetonto proponis pli altan prezon.

Tiam komenciĝis duobla serĉado, kiu tre rapide fariĝis triobla. Li unue devis serĉi lokon por organizi la somerlernejon, ĉar Esperanto-domo certe ne estos trovita por la somero, kaj tio estis tiam urĝa afero. Fine dank' al forta helpo de bona amiko, H. Micard trovis domegon en Houlgate, sed ĝi estis libera nur dum dek du tagoj.

Li devis ankaŭ serĉi alian domon por realigi la planon de Esperanto-domo. Tiu serĉado ne estis pli facila ol la antaŭa : li paciencie legis anoncojn en la ĵurnaloj, kaj vizitis ĉiujn bienojn, kiuj, laŭ la teksto, ŝajnis taŭgaj. Pro tiuj necesaj vizitoj, kaj ĉar li antaŭvidis, ke li devos tre ofte vojaĝi inter Epineux-le-Séguin kaj la Esperanto-domo post ĝia aĉeto, li serĉis domojn nur en la regiono ĉirkaŭanta sian vilaĝon, kaj tio multe malpligrandigis la eblecojn. Li tamen trovis sufiĉe taŭgan domon en Brûlon.

Rapide venis la somero ; en julio 1951, aperis speciala numero de Esperanto-Lernejo (tiama revuo de G.E.E.), kie estis presita « cirkulero al la esperantistoj ».

Jen kiel, per sia tre propra stilo, li prezentis la aferon al la legantoj :

Amikoj, neniam G.E.E. petis tiom pezan sed fruktodonan taskon de vi. Se vi sukcesos, vi estos, kredis min, belege servinta la esperantistan movadon. Kaj kion vi devas fari ? Promesi al ni monon : kvindek mil, dudek mil, dek mil, kvin mil, ĉiu laŭ sia eblo. Bieno garantios vian prunton. Sed ĉifoje, pli ol neniam, vi devas mem agi. Ne diru : « La najbaro sendos monon. » Jes, li

sendos monon, sed via helpo devas aldoniĝi al lia. Neniu estas riĉega, sed per kolektiva asocio ni trovos, se vi volos, la milionojn necesajn, por ke fine grandiĝu la esperantista movado.

Amikoj, vi havas la parolon.

H. Micard.

Ekde tiu dato, dum pluraj monatoj, ĉiu numero de *Esperanto-Lernejo* alportis tian alvokon. Neniam H. Micard trovis la sescent esperantistojn, kiuj pruntedonus po dek mil frankoj. Kaj la konstanta demando estis, por tiu homo, kiu en sia propra domo neniam volis aĉeti iun aparaton, se li ne havis la necesan sumon en la poŝo : « Ĉu ni povos pagi en la ĝusta tempo ? »

En septembro 1951, S^{ro} Philippe, arkitekto, prezidanto de U.E.F. (franca Esperanto-asocio), venis en Brûlon-on por viziti la domon kun gesinjoroj Micard kaj la posedantoj. Post la vizito li opiniis, laŭ arkitekta vidpunkto, ke la domo tre taŭgus : oni facile povus transformi ĝin por kolektiva uzo. Do la aĉeto estis tuj decidita ; ĝi eĉ estis efektivigita per papero subskribita de la posedantoj, de S^{ro} Micard kaj S^{ro} Philippe, kaj festata ĉirkaŭ bona vinbotelo. Oni rendevuis ĉe notario por la lastaj formalajoj.

Sed subite, kelkajn tagojn antaŭ la oficiala vendo, unu el la posedantoj simple rifuzis, pro tute ne klaraj kaŭzoj, vendi la domon al la asocio... Nova malsukceso...

Naskiĝo de la asocio Kulturdomo de francaj esperantistoj

INTERTEMPE okazis somerlernejo en Houlgate. Neniu somerlernejo organizita de G.E.E. estis tiel mallonga, sed, ankaŭ, neniu estis tiel grava por la estonteco. H. Micard povis paroli kun esperantistoj pri la kara projekto ; li ne plu estis sola en sia vilaĝo. La noktoj estis mallongaj, sed la diskutoj tre fruktodonaj.

Tie estis pretigita la statuto de nova asocio, kies leĝa naskiĝo poste okazis en Parizo la 16^{an} de septembro 1951, kiam la unuaj kvardek kvin akciuloj balotis por tiu statuto :

Statuto de la kooperativa societo

ĈAPITRO UNUA : CELO KAJ KONSISTO DE LA SOCIETO

Paragrafo 1

Inter la ĉeestantoj kaj la personoj, kiuj aliĝas al la nuna statuto, estas fondita kooperativa societo kun variaj societa kapitalo kaj personaro, regata de la leĝoj de la 24^a de julio 1877 kaj la 7^a de majo 1917. Ĝi elektas la nomon : « Kulturdomo de francaj esperantistoj ».

Ĝia daŭro estas nelimigita.


La sidejo de tiu societo estas en la vilaĝo Epineux-le-Séguin (Mayenne). Ĝi povas esti translokita ien ajn en Francujo, laŭ decido de la membrokunveno, kiu kompetentas pri modifo de la statuto.

(La sidejo estas nun Grésillon.)

Paragrafo 2

Tiu societo havas edukan kaj distran karakteron. Ĝi obeas dum la kunvenoj la plej absolutan neŭtralecon rilate al politikaj kaj religiaj temoj.

Ĝi havas kiel celon la aĉeton de konstruaĵoj, terpecoj, materialo ebligantaj la Esperantan formadon, la intelektan kaj socian emancipon de ĝiaj membroj.



« La societo devas doni la eblecon partopreni staĝon por formado de gvidantoj. »
(4^a kultura semajno, Pasko 1966.)

Krom la nutrado kaj la loĝado, ĝi devas doni al ili ĉefe la eblecon :

a) partopreni ĉiujare la esperantistajn somerlernejojn, staĝojn por formado de gvidantoj, internaciajn renkontiĝojn, kongresojn, ktp.;

b) komune studi la demandojn rilatajn al instruado kaj disvastigo de Esperanto;

c) instigi en Kulturdomo de francaj esperantistoj la organizadon de prelegoj kaj agadoj praktikaj, edukaj, artaj, teknikaj kapablaj plibonigi la sciojn de ĉiuj partoprenantoj;

d) organizi la distrojn de la tuta kolektivo pere de amikaj kunvenoj, artaj manifestadoj : teatraĵoj, filmprezentadoj, koncertoj...;

e) faciligi la fizikan edukadon de la membroj per sport-praktikado : manpilkado, teniso...

Interna regularo difinas la kreon kaj administradon de specialigitaj komisionoj interne de Kulturdomo de francaj esperantistoj, kaj difinas ilian agadon.

Paragrafo 3

La minimuma societa kapitalo estas fiksita je la sumo de sescent mil frankoj. Ĝi estas dividita en sesdek partoj de dek mil frankoj.

Ĝi povas esti senlime plialtigita pere de novaj akcioj de malnovaj aŭ de novaj societanoj. La parto, kiu permesas fariĝi membro de la societo estas fiksita je dek mil frankoj. Ĝi ne produktas profiton.

Por esti membro de la societo necesas ne nur esti posedanto de unu parto, sed esti akceptita de la administra konsilantaro, post prezento fare de du membroj de la societo.

ĈAPITRO DUA

Paragrafo 13

La membro-kunveno havas taskon aŭdi la raporton de la administrantoj kaj de la kontkomisaroj, pri la bilanco kaj la kontoj de la societo. (...)

Ĝi interkonsiliĝas kaj decidas suverene, en la limoj de la statuto, pri ĉiuj demandoj de la tagordo. Ĉiu societano disponas nur pri unu voĉo, kiom ajn estas la nombro de la partoj. Membro-kunveno interkonsiliĝas valide nur se unu sesono de ĝiaj membroj ĉeestas aŭ estas reprezentata.

ĈAPITRO TRIA

Paragrafo 16

Membro-kunveno povas, laŭ kondiĉoj fiksitaj por modifi la statuton, publikigi la malfondon de la societo.

Ĝi nomas unu aŭ plurajn likvidantojn. En la daŭro de likvido, la povoj de la membro-kunveno pludaŭras; ĉiuj valorpaperoj kaj ĉiuj mebloj kaj konstruaj posedaĵoj estas monigitaj de la likvidantoj, kiuj havas je tiu celo la plej vastajn povojn.

La neta sumo, post forpreno de likvidaj elspezoj kaj pago de asociaj ŝuldoj, estas unue destinita je repago al la societanoj.

Se tiuj diversaj faroj postlasas aktivan pluson, tiu ĉi estas atribuita al iu Esperanto-organizo antaŭe nomumita de la membro-kunveno.

Kvankam tiu teksto estas sufiĉe klara, ŝajnas necese substreki la originalan karakteron de tiu statuto. Je financa vidpunkto la akcioj donas neniun renton. Tiu kooperativa asocio celas nur disvastigon de Esperanto kaj ne pliriĉigon de la societanoj. Krome, kiom ajn nombraj estas la akcioj de akciulo, li havas nur unu voĉon en diskutoj kaj decidoj. Tio estas tre grava punkto, kiu donas al ĉiu, riĉa aŭ ne riĉa, saman pozicion rilate al estrado de la kulturdomo. Tiamaniere la kulturdomo ĉiam restos ĉiesa.

La ĉeestantoj de la unua membro-kunveno de la 16^a de septembro 1951 ankaŭ balotis por jena administra konsilantaro :

Honor-prezidanto : S^{ro} Philippe.

Prezidanto :	S ^{ro} Micard.
Vic-prezidanto :	S ^{ro} Volqueman.
Sekretario :	S ^{ro} Bidoit.
Kasisto :	S ^{ro} Coussé.
Help-kasistino :	S ^{ino} Trésorier.
Estraranoj :	Fino J. Dedieu, S ^{roj} Genuit, Busson, Thebaud, Guillaume, Bodereau.

Tiuj homoj estis tre agemaj kaj sindonemaj amikoj de H. Micard. La plimulto estis G.E.E.-anoj.

Aĉeto de la Esperanto-domo

REVENINTE hejmen H. Micard estis prezidanto de asocio kun bela statuto kaj mirigaj projektoj kaj celoj. Sed ĝi ne havis domon, kaj ĝi havis malmulte da mono : unu milionon cent mil frankoj. Tamen ne plu estis tempo por heziti.

Denove la aŭtomobilo de H. Micard trakuris kamparon ĉirkaŭ Epineux ĉiŝaŭde. Denove anoncoj en la ĵurnaloj estis atente studataj ĉiuvespere.

En la numero de novembro de *Esperanto-Lernejo*, Micard diris :

Mi vizitis plurajn bienojn. Mi skribis kelkajn dekojn da leteroj, kaj mi ricevis multnombrajn proponojn. Oni certe diros al vi, kiel oni diris al mi : oni ne povas vendi grandajn domojn aŭ kastelojn. Mi ankaŭ kredis tion, kaj jen pluraj kasteloj estas aĉetitaj, antaŭ mi, je tre altaj prezoj.

En la komenco de oktobro, li sendis unuan oficialan cirkuleron, por informi la administrantojn pri la rezultoj de tiuj klopodoj.

Cirkulero 1 al la administra konsilantaro

Mi ne kutimas longe insisti pri la pasinteco, kaj laŭ mi Brûlon estas pasinteco. Tuj kiam mi ekvidis eblecon pri malsukceso, mi denove serĉis. Mi jam multe trakuris, kredis min.

Mi vizitis, apud La Flèche, grandan domon, kiu povus konveni ; la prezo estis proksimume la sama kiel tiu de Brûlon, sed la bieno estas en kamparo kaj ne sufiĉe alloga kaj plaĉa. Mi devas viziti la 18^{an} de oktobro du kastelojn ; la unua je du kilometroj de Baugé, la dua en la urbo Baugé mem. Oni parolis al mi pri du milionoj kaj duono por unu, kaj tri milionoj por la alia.

En ambaŭ estus sufiĉe da loko por loĝigi kvindek personojn sen plia konstruaĵo. Mi komunikos al vi la rezulton de mia vizito. Ĉu vi opinias, ke oni povas elspezi tri milionojn anstataŭ du milionoj kvincent mil ? Ni nun havas en la kaso unu milionon sescent mil frankoj, kaj ducent mil frankoj estas promesitaj.

La 18^a de oktobro 1951 estis ĵaŭdo, kaj gesinjoroj Micard ne laboris en tiu tago. Tial bienvendisto el Sablé kondukis ilin por viziti la kastelon proksiman al Baugé, kies nomo estas Grésillon.

Veturante sur la aleo, kiu iras al la kastelo, kaj vidante tiun bel-egan domegon, gesinjoroj Micard rigardas unu la alian :

« Tiu vizito estos tia kiaj la aliaj – ili pensis – kaj donos neniun rezulton. La kastelo estas multe tro bela, neniam ni povos aĉeti ĝin. »

Ili tamen vizitis, kaj ilia unua impresio plifirmigis : la kastelo estis tre bele meblita, ĉar la posedantino ankoraŭ ne transloĝiĝis.

Kiel promesite Micard sendis duan cirkuleron.


Cirkulero 2

Mi vizitis hieraŭ la kastelon Grésillon je du kilometroj de Baugé (3500 loĝantoj). Fervoja linio Paris-Le Mans-Saumur. Ekzemplo : foriro el Parizo je la 19^a, alveno en Baugé je la 22^a kaj duono. Multaj aŭtobusoj el Angers kaj Tours. La regiono estas agrabla. La kasteloj de Loire estas proksimaj. Mal-agrablaĵo por mi : la kastelo situas pli ol kvindek kilometrojn de Epineux-le-Séguin.

La kastelo estas belaspekta. Estas du etaĝoj kaj pli ol dudek ĉambroj. Lageto trapasita de rivereto. Oni povas aranĝi banejon. Vasta ĝardeno, kampoj, arboj. Ĉio estas ebla por la estonteco. Ne estas elektra lumo en la kastelo, sed lineo estas konstruita. Restas nur interna instalado por fari. Por akvo, estas puto, kaj ni bezonas elektran motoron. Ne estas lavabo en la ĉambroj. La bieno enhavas, krom la kastelo, dek tri hektarojn da kampoj kaj dek kvin hektarojn da arboj.

Oni petas ok milionojn kvincent mil frankoj. Oni povas dispartigi la bienon, kaj aĉeti nur la kastelon kaj ok hektarojn per tri milionoj ducent mil frankoj aŭ tri milionoj tricent mil frankoj. Mi fotografis la kastelon, kaj mi preparas artikolon por Esperanto-Lernejo.

Jen la financa situacio. En la kaso : 1664900 ; promesitaj : 316000.



Sindonema kamaradino metis je nia dispono ducent mil frankojn. Se ni trovus dek aliajn, ĉio irus bone. Mia lasta alvoko alportis kelkajn mondonacojn. Sed estos necese alvoki la esperantistajn grupojn, se ni aĉetos la kastelon.

Eble S^{ro} Philippe povos veni.

La prezidanto, H. Micard.

Aldono : Estas varmiga hejtotubaro en parto de la kastelo.

La ĵaŭdaj vojaĝoj de gesinjoroj Micard daŭris. Sed nun estis senĉesa iro kaj reveno inter Baugé kaj Epineux-le-Séguin, ĉar la traktadoj por la aĉeto estis tre malfacilaj.

La financa aranĝo estis jena. La tuta bieno estis aĉetota de du personoj : sur unu flanko Henri Micard kaj la asocio, sur la alia flanko lignovendisto, kiu intencis dehaki la belegajn arbojn de la arbaro, kaj vendi ilin. Sur la bazo de tri milionoj kvincent mil frankoj por la ok hektaroj ĉirkaŭ la kastelo, Micard volis malaltigi tiun prezon ĝis tri milionoj da frankoj, kondamnante arbojn de «sia» parto, kaj metante ilin je la dispono de la lignovendisto. La prezo de ĉiuj arboj estis tiel diskutata, unu post la alia.

Fine la traktado sukcesis, kaj Micard sendis trian cirkuleron.

Cirkulero 3

S^{ro} Philippe venis la 2^{an} de novembro. Post longa rigardo li diris : « Mi admiregas ; estas por ni belega afero. » Kaj ni tuj ambaŭ decidis la aĉeton. Sed je la fino de la tago la vendisto postulis de ni tri milionojn kvincent mil frankoj pro la vasteco de la bieno, kiun ni deziris. Ni ne akceptis, ĉar ŝajnis neeble elspezi pli ol tri milionojn da frankoj. La postan tagon mi denove traktadis, kaj, post longa diskutado pri la diversaj dikaj arboj disfalgotaj, mi sukcesis aranĝi la aferon por tri milionoj.

S^{ro} Philippe estis en Parizo. Li telefonis al mi la 4^{an} de novembro je la 8^a. Mi donis al li la detalojn de la interkonsento kun la vendistoj, kaj li donis al mi sian aprobon. Do mi subskribis hieraŭ vespere (la 4^{an} de novembro) specialan paperon kun la reprezentantoj de la vendisto, kaj nia kasisto, S^{ro} Coussé, pagis per poŝta ĉeko la sumon de unu miliono kvincent mil frankoj.

Jen la kondiĉoj por la pago de la bieno. Hodiaŭ : 1500000; la 15^{an} de novembro 1951 : 500000; la 30^{an} de novembro 1951 : 500000; la 15^{an} de decembro 1951 : 500000; sume : 3000000.

Krome, ni devos pagi kiel eble plej rapide la diversajn impostojn : pli ol sepcent mil frankoj.

Sed bedaŭrinde tiuj kondiĉoj devas esti proponitaj al la posedantino, kiu deziris ricevi la tutan sumon la 30^{an} de novembro. Mi ne povis promesi tion. Se la posedantino ne akceptos tion, oni redonos al ni la ĉekon, kaj ĉio estos rekomencenda.

La membro-kunveno de la 16^a de septembro donis al mi la necesan povon por trakti, sed tamen mi ŝatus ricevi vian aprobon. Mi asertas al vi, ke tio estas bonega afero, kiu ne estas komparebla kun Brâlon.

Nun ni devas trovi la necesan monon. S^{ro} Philippe promesis helpi nin. Mi mem alvokos miajn esperantistajn amikojn. Agu same, kaj, se vi povas, montru ekzemplon...

Sed ve! La posedantino ne akceptis kaj postulis kontantan pagon. Ŝi eĉ postulis pagon per orbrikoj... Nova malsukceso... kaj nova traktado, ĉar Micard nun deziris tiun kastelon. Li konsciis, ke ĝi vere taŭgos por la asocio; li ĉefe sciis, ke li neniam trovos aliloke tiel belan Esperanto-domon.

Tiu nova traktado estis necesa pro la lignovendisto : li proponis tuj doni la tutan sumon postulatan, sed petis pli favorajn kondiĉojn por si en la dispartigo.

La diskutoj estis tre akraj dum tuta tago (la 15^{an} de novembro). Oni atingis la prezon de tri milionoj cent mil frankoj por la bieno aĉetota de la asocio. Micard ne volis pagi pli ol tri milionojn da frankoj, kaj finfine sukcesis dank' al ruzo.

Ĉar la lignovendisto ne plu volis cedi, Micard foriris el la bieno, sed sur la placo Anne-de-Melun en Baugé li ŝajnis paneon de aŭtomobilo. La lignovendisto, kiu sekvis en sia propra aŭtomobilo, baldaŭ alvenis, haltis, kaj... la diskutoj rekomenciĝis, sed sur aliaj bazoj. Ĝis tiam oni estis nur priparolintaj la prezon de la arboj. Nun la lignovendisto konfesis, ke mankas al li du milionoj da frankoj por fari la tujan pagon. « Sed ni havas tiun sumon, diris Micard, kaj ni povas doni ĝin al vi. » Tiam forlasante la lastajn cent mil frankojn la lignovendisto fine cedis.

Tiu fina sukceso estis tuj efektivigata per papero subskribita de Micard kaj la lignovendisto. Tiu subskribado eĉ okazis sur la motoro mem de la aŭtomobilo, ĉar ne ekzistas tabloj sur la placo Anne-de-Melun...

Prudenta nun, Micard atendis la respondon de la posedantino por konigi la finan rezulton al la administra konsilantaro, kaj sendis 4^{an} cirkuleron nur la 19^{an} de novembro.

Cirkulero 4

... Fine ni interakordiĝis. Jen la kondiĉoj :

Kontanta pago : 2000000; la 30^{an} de novembro 1951 : 500000; la 30^{an} de decembro 1951 : 500000; sume : 3000000; kompreneble krom la impostoj kaj cent mil frankoj por maklera procentaĵo.

Mi eksciis sabate (la 17^{an} de novembro), ke ĉio estas aranĝita kun la posedantino. Mi pagis du milionojn da frankoj. Mi kalkulas kun la promeso de U.E.F. por la pago de la 30^a de novembro. Mi esperas, ke mi povos pagi la

promesitan sumon de la 30^a de decembro per la ducent sesdek du mil frankoj, kiuj restas en nia kaso kaj la mono, kiu estas promesita de diversaj amikoj. Restas pagotaj la impostoj kaj la maklera procentaĵo, je la fino de januaro : sepcent mil frankoj.

Mi denove alvokas la esperantistojn. Estas necese, ke mono denove venu. Vidu viajn amikojn kaj viajn eblecojn. Agu ĉe la lokaj grupoj. Ni havas gravan responson. Sed, kredis min, ni havas belan bienon. Tio estos sensimila en la esperantista mondo.

Ĉu mi ne pravis? Mi ne povas pensi tion. La afero certe sukcesos, se la entuziasmo ne malgrandiĝos. Restas ankoraŭ multo por fari, sed la rezulto meritas tion. Diru al mi, kion vi opinias. Mi bezonas scii, ĉu ĉiuj akompanos min.

H. Micard.

Certe la esperantistoj havis belan bienon, sed pli certe ankoraŭ restis multo por fari : Micard ne havis en la poŝo la necesan monon por pagi...

Kelkajn tagojn antaŭ la 30^a de novembro, li ricevis telefon-alvokon : U.E.F. ne plu povas doni la promesitan monsumon... Ne estas eble rediri la respondon de H. Micard, ĉar vere ne decas traduki la vortojn uzitajn. Sufiĉas scii, ke malgraŭ grandaj malhelpoj la mono venis en ĝusta tempo. Sed Micard ankoraŭfoje tute ne dormis dum tiu nokto, ĉar nur la morgaŭan tagon li sciis, ke U.E.F. finfine donos la monon.

H. Micard devis ankoraŭ multe peti, klopodi por pagi ĉion. En januaro 1952 la tuta kastelo apartenis al la asocio, sed restis mono nenie : la ĉekkontoj de gesinjoroj Micard kaj de kelkaj amikoj estis absolute malplenaj.

Unua Vivojaro de la Esperanto-domo

NE NUR la ĉekkontoj estis malplenaj en januaro 1952. En la kastelo mankis ĉio : tabloj, seĝoj, ŝrankoj, elektra kurento, fluanta akvo, manĝiloj, ktp. El la belaj mebloj, kiuj estis antaŭe en la kastelo, Micard povis aĉeti nur kuirfornon kaj ĝardenbenkojn.

La alvokoj en *Esperanto-Lernejo* rekomenciĝis. Li petis monon por aĉeti la necesajn aĵojn :

Ducent mil frankoj estas necesaj por aĉeti tablojn, seĝojn, kuirilojn. Oni devas aĉeti elektraĵn ilojn, lavabojn, litojn (kompleta lito kostas dudek mil frankojn, kaj ni bezonas kvindek, kalkulu).

Li ankaŭ petis kuraĝulojn por labori en la kastelo :

Helpon ! Ni deziras mem instali elektran kurenton inter la 13^a kaj la 20^a de aprilo. Ni ankoraŭ bezonas tri aŭ kvar kamaradojn por nin helpi.

Sammaniere estis instalita fluanta akvo. Li ne nur petis, li ankaŭ laboris kun S^{ino} Micard. Ili transportis el Epineux plej diversajn aĵojn : littukojn, kovrilojn, litojn, seĝojn, tablojn, ktp.

Micard ankaŭ pretigis programon por la venonta somero jam en februaro. Estis necese, ke gastoj venu dum la somero por pruvi, ke la Esperanto-domo povas vivi, kaj, pli simple, por plenigi la kason.

Jen la programo proponita en *Esperanto-Lernejo* de marto 1952 :

- de la 1^a ĝis la 14^a de julio : internacia renkontiĝo kaj teatra studperiodo en Esperanto ;
- de la 15^a de julio ĝis la 4^a de aŭgusto : somerlernejo de G.E.E. ;
- de la 5^a ĝis la 17^a de aŭgusto : dua somerlernejo por ĉiuj ;
- de la 18^a ĝis la 31^a de aŭgusto : seminario kaj dua internacia renkontiĝo ;
- septembro : kastelo malfermita al ĉiuj, kiuj tion deziras.



Por havigi monon al la asocio, Micard imagis ankaŭ loterion, kiun li anoncis en *Esperanto-Lernejo* de aprilo 1952 :

Ni havas rajton organizi loterion, kun kapitalo de unu miliono kvincent mil frankoj dividita en dek kvin mil biletoj po cent frankoj, kies gajno estas

dediĉita al meblado de la kastelo Grésillon. Ni tuj ekvendas la biletojn, kaj ni petas de ĉiuj esperantistoj, ke ili faru grandan klopodon por disvendi ilin... Jen la ĉefaj haveblaj objektoj : unu lavmaŝino, unu tendo, unu biciklo, unu radioaparato, ktp. La lotado okazos en Grésillon la 31^{an} de aŭgusto 1952.

Fine venis la somero, kaj unuafoje la Esperanto-domo funkciis. La litoj apartenis al lernejestro de Baugé, kiu konsentis pruntedoni sian materialon dum la ferioj. La littukoj kaj kovriloj apartenis al la ĉeestantoj, kiuj kunportis la plimulton de la necesajoj. Sino Micard sole okupiĝis pri la preparado de la manĝoj. Ĉiuj ĉeestantoj siavice lavis la telerojn, senŝeligis la legomojn, ktp. Ne estis servistoj, ĉar la financa situacio ne ebligis tian « lukson ».

La pioniroj de la restadoj en Grésillon, kiuj same laboris en la kuirejo kiel en la lernoĉambroj, estis cent kvindek, kaj, per sia ĉeesto, ili donis al la Esperanto-domo la unuan necesan impulson. Ili ebligis la tiujarajn enspezojn, kaj pruvis, ke Grésillon povas vivi.

Ĉu estis necese ?

La oficiala inaŭguro, la 31^{an} de aŭgusto, ne nur malfermis la pordon al la estonteco, ĝi ĉefe povis montri al eksterlandaj kaj francaj eminentuloj, kaj al lokaj urbestroj, kiuj ĉeestis la manifestadon, jam vivantan Esperanto-domon.

1952 - 1966 : dek kvar jaroj dediĉitaj al la Esperanto-domo

EN SEPTEMBRO 1952, reveninte hejmen, Micard ne retrovis la ĉiujaran laboron en sia lernejo. Li estis nun emeritulo. Por la plimulto, emeritiĝi signifas, ke oni sufiĉe laboris dum la vivo, kaj nun estas tempo por ripozi. Male Micard opiniis, ke fine li havas tempon por labori, kaj fakte la juna nefirma Esperanto-domo bezonis ĉiujn liajn momentojn.

Estis, kompreneble, necese ordigi ĉiujare la financajn aferojn, por ke neniu surprizo okazu sur tiu flanko. Estis necese okupiĝi pri ĉiuj detaloj koncerne la konstruaĵojn, kiuj postulis riparojn, la ĝardenon, kiu ne ĉiam donis la esperitajn fruktojn, ktp. Estis necese pretigi allogajn programojn, por ke venu esperantistoj. Estis necese ĉeesti ĉiujn restadojn, precipe dum la unuaj jaroj, kaj labori en la kuirejo kaj en la oficejo, por ŝpari tiom da mono kiom eblis, kaj tiel ebligi la plej rapidan kreskon de la kulturdomo.

Samtempe gesinjoroj Micard devis respondi la plej diversajn kritikojn. Kelkaj esperantistoj opiniis, ke oni tro multe parolis la internacian lingvon en Grésillon; aliaj tro malmulte.

Kelkaj personoj volis pli da lukso en la kastelo, aliaj bedaŭris la simplecon de la unua jaro. Ili ankaŭ trovis samideanojn, kiuj ne komprenis, kial ekzistas programoj, kaj kiuj preferus nur libertempi en esperantista etoso, sed, kiam ili proponis liberajn restadojn por ripozi, neniu venis.

Tiamaniere, kompreneble, ĉiuj tagoj de gesinjoroj Micard estis dediĉitaj al Grésillon. Sed, cetere, konstanta, streĉa problemo okupis ilin : kiu zorgos pri la funkciado de la kulturdomo ? Efektive la vivo en la kastelo lacigis ilin pli kaj pli, kaj ili sentis sin maljuniĝantaj.



Gesinjoroj
Micard.

Jam en 1954 S^{ro} Bidoit helpis ilin. Bedaŭrinde malakordoj naskiĝis inter S^{ro} Bidoit kaj S^{ro} Micard pri la estrado de la kulturdomo, kaj S^{ro} Bidoit foriris. En 1957 S^{ro} Allaz kaj en 1963 S^{ro} Dupuis venis kiel gvidantoj de la domo, sed tiu tasko ne plaĉis al tiuj personoj, kaj ili ne restis.

Intertempe gesinjoroj Babin kaj gesinjoroj Thébaud kun aliaj amikoj helpis gesinjorojn Micard ĉiusomere ĝis 1963. Tiam vidinte, ke neniu vere povis anstataŭi lin, Micard proponis al siaj amikoj kreadon de taĉmentoj, kiuj dumsomere okupiĝus ĉiu pri unu periodo, tiel dividante la laboron.

En somero 1964 tiuj taĉmentoj funkciis, kaj gesinjoroj Micard ne plu estis devigataj ĉeesti la restadojn en Grésillon. Estis tre korŝire por Micard forlasi «sian domon». Sed plenkonscie li tion aranĝis, ĉar por li pli grave estis, ke vivu la kulturdomo. Kiam li sentis, ke li ne plu kapablos, pro malsano, respondi pri ĝi, li transdonis la gvidadon al aliaj sufiĉe frue, por ke tiuj, kiuj poste prizorgos la aferon, trovu ĉe li ankoraŭ helpon je siaj unuaj paŝoj.

Li mem proponis al la administra konsilantaro sian anstataŭanton kiel prezidanton. Li ne plu volis la titolon, kiam li ne plu povis labori, kaj tiel S^{ro} Babin povis ricevi konsilojn en la unuaj monatoj de sia prezidanteco. Micard konservis la financon taskon, kiun li forlasis nur du monatojn antaŭ sia morto. Tiam konante sian sanstaton li skribis al S^{ro} Babin:

« Mi sendas al vi ĉion, mi ne plu kapablas fari ion ajn... »

La Kultura Vivo de la Esperanto-domo

LA ĈEFA studperiodo organizita en Grésillon estis, kompreneble, la **L**somerlernejo; ĝi precize estis la kaŭzo, kiu instigis la aĉeton de Esperanto-domo. Tiun tradician periodon organizis G.E.E. ĝis 1957. Je tiu dato S^{ro} Micard kaj tri el liaj amikoj estis devigataj elekti inter la gvidado de la kulturdomo kaj la aparteno al la konsilantaro de





G.E.E. Ili elektis la kulturdomon. De tiu tempo estis organizitaj en aŭgusto la «esperantistaj kulturaj semajnoj». Ili havis familian etoson, sed oni tamen multe laboris : tri Esperanto-kursoj, al kiu oni aldonis bindarton en 1954 kaj plektadon en 1957.

Tute aliaj aspektis la «internaciaj restadoj». Ili estis altnivelaj kaj seriozaj periodoj, dum kiuj samideanoj el la plej diversaj landoj povis kompari siajn opiniojn pri historiaj aŭ nunaj problemoj, lerni pri ĉiuj sciencaj aŭ turismaj temoj. Ili ankaŭ povis aŭskulti prelegojn de la plej eminentaj esperantistoj : D^{ro} de Waard gvidis tiun studperiodon de 1953 ĝis 1956. Prof. Lapenna, Auld, Waringhien, Albault kaj Watier samtempe vizitis la kastelon en 1957. Poste venis ankaŭ D^{ro} Neergaard en 1958, S^{ino} Lapenna kaj S^{ro} LLech-Walter en 1961, S^{ro} Dupuis en 1962, S^{ro} Major en 1963 kaj 1966, S^{ro} Dalmaŭ en 1964,

Prof. Setala, Borman, Duc-Goninaz, S^{inoj} Roux kaj Cheverry en 1965, kaj aliaj.

Krom tiuj du ĉefaj restadoj la kulturdomo provis kelkajn aliajn, kiuj pli-malpli sukcesis.

En 1956 estis kreita «kurso de franca lingvo por eksterlandanoj per Esperanto», kiu daŭris ĝis 1960, sed ne havis grandan ĉeestantaron.


Pli sukcesplenaj estis la provoj kun «preparado de la tri ekzamenoj» kaj la kursoj organizitaj de U.E.F. Tiuj du restadoj sufiĉe similaj okazis la unua frue en julio, kaj la alia malfrue en septembro. La ĉeestantaro ne estis tre multnombra, sed la studado tre bona.

Baldaŭ aperis, ke estus ankaŭ necese malfermi la kastelon dum vintraj kaj Paskaj ferioj.

Dumvintre, pro la necerta vetero, okazis nur unu fojon kultura restado, gvidata de S^{ro} Dupuis kaj S^{ino} Roux en 1962. Dum la aliaj vintroj kunvenis kelkaj amikoj por labori. Oni ordigis diversajn paperojn kaj ilojn necesajn al la vivo de la Esperanto-domo. Oni ankaŭ esperantigis kelkajn filmojn. Tiu laboro postulis tre grandan nombron da horoj, ĉar, kvankam ŝajnas simple surbendigi muzikon kaj Esperantan tekston, la teknikaj obstakloj montriĝis tre grandaj kaj multnombraj. Tiuj vintraj restadoj ĉiam finiĝis per ĝoja nokta festeno.

Malsamaj estis la Paskaj ferioj. De 1956 ĝis 1961 okazis kursoj pri Esperanto kaj bindarto, sed en 1962 U.E.F. organizis la unuan «kulturan semajnon». La sukceso estis tuj tre granda. Multaj estontaj geinstruistoj ĉeestis kaj donis al tiu periodo tre specialan etoson : junan, vivoplenan, eĉ bruan. En 1967 okazis la sesa kultura semajno.

De 1952 ĝis 1966 pli kaj pli multnombraj estis la vizitantoj. Ĉiujare venis gesamideanoj ankoraŭ nekonataj, sed ankaŭ multaj estis la amikoj, kiuj jam plurfoje ĉeestis kursojn en Grésillon. Jam sidis en



la salono aŭ la kursoĉambroj, jam ripozis sur la herbejoj de la Esperanto-domo miloj da homoj el ĉiuj kontinentoj; miloj da ge-esperantistoj venis esperplenaj aŭ timemaj kaj foriris kun kapo plena de agrablaj sentoj, okuloj plenaj de larmoj. Homoj koniĝis kun homoj, amikoj adiaŭis amikojn.


En Grésillon ĉiujare plilongiĝas la homa rondo ĉirkaŭ la mondo...

... dank' al homo, kiu estis sufiĉe sindonema kaj kapabla por konkretigi idealon.

Kelkaj Datoj en la vivo de Grésillon


Septembro 1954

GRUPO de amikoj eliris el laĝeto ĉarumplenon post ĉarumpleno da koto, kaj poste kovris la fundon per ŝtonoj, por konstrui banejon. La 5^{an} de septembro dum ceremonieto H. Micard masonigis



la lastan ŝtonon. Samtempe li enmasonigis paperrulon, sur kiu estis skribitaj la nomoj de ĉiuj personoj, kiuj estis faritaj donacon al la kulturdomo.

Sed la akvo de tiu unua banejo estis tre malklara kvankam jam ekzistis kribrilo. Tial la masonado de la fundo kaj de la flankoj estis decidita. Unu triono de la fundo estis masonita en 1960, kaj la restantaj partoj en 1961.




1955-1956

Nova kuirforno, kies fumo iris tute en la kamentubon kaj ne, kiel antaŭe, en la kuirejon, estis instalita. Tiu kuirforno ebligis ankaŭ havi varman akvon ĉe krano sur la unua etaĝo.


Ĉar la kastelo devis preni sian akvon el puto per normala pumpilo, ne sufiĉa kvanto estis disponebla je difinitaj horoj, precipe matene.

Tial estis aldonita granda ujo, kiu pleniĝis aŭtomate. Sed tio ne solvis komplete la « akvoproblemon » en la kastelo. Krom paneoj de la pumpilo kaj malpleniĝo de la puto, Micard havis zorgojn pro la koloro de la akvo, kiu kvankam tute trinkebla estis strange flava. Kribrilo venis en 1957 por doni al la akvo pli belan aspekton.

1956-1958



Por krei rilatojn kun loĝantoj de Baugé, kaj por plenigi la kason, la kulturdomo organizis plurajn kermesojn, kiuj okazis la lastan tagon de la somerlernejo. Krom budoj, kie oni povis aĉeti kaj ludi, estis prezentitaj spektakloj : teatraĵetoj kaj dancoj. Pro ne granda sukceso sed granda laboro ili okazis nur en la jaroj 1956, 1957 kaj 1958.



1959

En 1959 estis inaŭgurata la strato Zamenhof en Baugé.

Tiu strato kondukas de Baugé (placo Anne-de-Melun) al Grésillon.

1963

Multaj aĝoj ankoraŭ mankis, kaj la kastelo montriĝis tro malgranda. Subite ĉio estis ebla dank' al sindonema samideanino, kiu donacis al la kulturdomo plurajn milionojn. Tiu sumo ebligis la konstruon de kvar novaj ĉambroj en subtegmentejo kaj de kvar duŝĉambroj. Nova hejtilo estis instalita, kaj la malnova transformita tiel, ke ĝi funkciis per mazuto. Tio ebligis la hejtadon de novaj ĉambroj. Ĝi permesis ankaŭ antaŭvidi la instaladon de fluanta varma akvo en ĉiuj ĉambroj.

Bedaŭrinde, pro propraj kaŭzoj, tiu persono poste postulis repagon de la tuta «donacita» sumo. Sed ĝi kreis financajn malfacilaĵojn dum la sep sekvantaj jaroj. Fine en tiu jaro estis aĉetitaj

diversaj kuiraparatoj kiel fritilo kaj teleraro dekoraciita per bildo de la kastelo.

1952-1968

La revuo eldonita de G.E.E. (*Esperanto-Lernejo* ĝis 1952, kaj poste *Espéranto et Culture*) regule publikigis ĉiujn detalojn de la vivo de la kulturdomo ĝis 1957.

Ekde la jaro 1958 *les Cahiers de Grésillon* dum unu jaro, kaj poste *Kulturaj Kajeroj* propagandas por la Esperanto-domo, kaj prezentas tre interesajn artikolojn pri plej diversaj temoj.



En mia kastelo la esperantistoj
de la diversaj landoj sentas
ke ili estas ~~en~~ en sia
propra lando.
Por mi estas la plej
bona rekompenco.

H. M

La unua eldono, kromnumero de *Kulturaj Kajeroj*, aperis en aprilo 1968.
Ĉi dua revizita eldono, korektita de Christian Rivière, aperas en decembro 2008.
Presis Dominik Bertrand, Kulturdomo de Esperanto, Grésillon, 49150 Baugé, Francujo.